.

# & Sanga nokto aŭ venĝo de Amoro:

< Rekante 20 el 34 batoj por strofo, entute 272 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Julio Baghy (Preter la vivo, Budapest 1923) kun enkonduka noto "Balado el la dudeka centjaro". Baladigis Martin Strid (2017) per feroaj melodio kaj rekantaĵo de Vilmunda balado.>

**(#Melodio:**

<1,6:34> (# Vilmunds kvæði: e;fa /fami sofa fami mi;re rere dore mi;mi mimi fami fami fa;so sofa fami reldo;

(#Rekantaĵe: mimi fa mi re; reerere dore mi; mimi mimi mi fa;so sofa fami fami reldo; mimi fa mi re)

)×8 )+

**(&Strofoj:**

'1 Ĉe /sunsubir' la amsopir' ; la koron de knabin' ; instigas jen por noktpromen' ; kun knab', amanta ŝi2n.

(×: **Dancu mastrino ; belan elektas mi. ; Dancu min al mano ; ja bele kiel povas vi2. ; Dancu mastrino**.)

'2 Kaj kompliment' de arda sent', ; alloga sorĉa fort' ; nun pelas ŝin kaj lin al fin': ; al domo en la kort'. .....

'3 Dum idili' la amo-di' ; ridetas kun petol'... ; En luna bril' muzikas gril' ; por la duopa sol'. .....

'4 Sed - ho ĉiel' - la sortkruel' ; frapadas sur pavim'! ; Pro tio jam la fajra flam' ; estingas sin en tim'... .....

'5 Nun, kiel bov', kun laca mov' ; aperas grasa vir' ; kaj sonas klak', bruanta krak' ; kun grumble ronka spir'... .....

'6 Interne du atendas plu ; por bona kur-okaz'... ; Ekstere kri'! Fenestron li ; ekrompis per la naz'. .....

'7 Terure! Sang' el grasa vang' ; kaj nazo fluas for. ; Kun plenda blek' al apotek' ; lin pelas la dolor'. .....

'8 Moralo el ĉi sangfabel': ; La nazon tenu for ; de amrilat', ĉar venĝobat' ; vin trafos de Amor'. .....)